



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 264

Aprilo, 2008

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto

Stevens Norvell — Kompostisto

Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson

329 Poplar Drive

Dartmouth, Nova Scotia

KANADO B2W 4K8

bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter

71 RidgeValley Road

Halifax, Nova Scotia

KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20

☆☆

KION ATLANTIKAJ KANADANOJ OPINIAS PRI EKSTERULOJ?

(televide dissendita en Atlantika Kanado la 18-an de marto, 2008)

Ni ofte jam aŭdis, ke marbordanoj (t.e. atlantikaj kanadanoj kiuj loĝas en la provincoj de Nov-Skotio, Nov-Brunsviko, kaj Insulo de Princ-Eduardo – la red.) estas inter la plej amikaj homoj en la mondo, kaj la plejparto el ni akceptas tion kiel veraĵon. Sed novaj esplor-rezultoj kontestas tion, kion ni kredas pri ni mem. Laŭ tio, kvankam ni estas tre amikemaj inter ni, multaj el ni maltrankviliĝas, ke nove-venintoj ekprenos niajn laborpostenojn kaj eĉ kaŭzos pliajn krimojn. Ni diras ke ni kredas, ke enmigrantoj pozitive efikos nian ekonomion, sed ni malinklinas akcepti novulojn, aparte en kamparaj regionoj kie ni plejmulte bezonas ilin.

Kion opinias marbordanoj pri eksteruloj estas grava parto de raporto „Interne-ekstere” (Inside Out), kiun eldonis Bristol Communications. Rick Emberley: „Oni povas veni kaj fariĝi unu el ni, sed oni vere devas difini la ‚nin’ laŭ niaj terminoj.” Rick Emberley parolas pri la sinteno de marbordanoj al enmigrantoj. Pripensu ĉi tiujn kontraŭdirojn en la raporto: la plejparto de marbordanoj kredas, ke enmigrantoj plibonigas la kulturon kaj ekonomion, sed 33% kredas, ke krimoj plioftiĝos, kaj 25% maltrankviliĝas, ke enmigrantoj prenos laborpostenojn de marbordanoj. Emberley: „Ni estas gastamaj, sed ne necese bonvenigemaj. Gastama signifas vidi iun surstrate kaj diri ‚Saluton’ kaj ‚Kiel vi fartas?’ ktp. Bonvenigema signifas enkonduki iun en la propran komunajon, kaj la pruvoj indikas, ke ni montriĝas iom pli fremdecaj, ol ni volas kredi.”

La raporto ankaŭ indikas informon, kiu povus ekspliki tion, kiel ĉi tiuj sintenoj estiĝis. Ekzemple, du trionoj konas siajn najbarojn. Tio estas preskaŭ 20% pli

granda ol la nacia meznumero (malpli ol 50% de kanadanoj konas siajn najbarojn). Kvardek procentoj de marbordanoj faras volontulan laboron, kaj plejparte ni emas havi grandajn familiojn kiuj bone rilatas inter si kaj restas en kontakto. Rick Emberley diras, ke niaj intimaj komunaj akcentas niajn pli pozitivajn ecojn. Sed li aldonas, ke tiu intimeco aldonas plakaĵon, barilon al novuloj, kiuj sentas sin pli fremdaj kiam ili alvenas al nia regiono. „Rilate al niaj sociaj strukturoj kaj niaj perceptoj pri la kvalito de vivo ĉirkaŭ ni mem, ni plejparte estas konservativemularo.”

Aleah Gustafson estas instruistino ĉe la Halifaksa Centro de Enmigranta Lernado. Ŝi diras, ke la plejparto de siaj studentoj, novaj al Kanado kaj pro lingvaj kaj kulturaj bariloj, estas maldungitaj kaj sentas sin nekonektitaj al sia nova socio. „Ili alvenis, ili estas gravuloj en siaj propraj landoj, multaj estas studentoj, kaj ili alvenas al Kanado kaj ili jam perdis sian laboron, ili jam perdis sian identecon...”

Gustafson diras, ke la plej grava barilo estas lingva, kaj Guzal Sultankulova konsentas pri tio. Ŝi estas uzbekistanino kiu enmigris antaŭ 4 jaroj, kaj unue la ŝanĝo estis malfacila. „Kiam mi unue alvenis, mi sentis min malkomforta, kiel birdo en kaĝo. Jes, ĉar mi ne konis kulturon, lingvon kaj ĉion.”

Ni malsciencie demandis al denaska marbordano pri kiel marbordanoj traktas fremdulojn. „Mi kredas, ke ni bonvenigas homojn, kiuj ne estas denaskuloj. Mi kredas, ke ni strebas por helpi ilin.” Sed tion diris Kebek-urbano, kiu priskribas kiel oni traktis lin antaŭ 27 jaroj, kiam li setlis ĉi tien. „Ho, kiel fremdulo, kiel iu, kiu devenis de alia planedo.” Do, ili ne estis sufiĉe amikemaj? „Ne, ne, ne, sed mi havis problemon pri la lingvo.”

Jen la demando: kiajn efikojn al nia estonteco havas tiaj sintenoj? Ni ja scias, ke pro la fakto ke junuloj pli ofte translokiĝas ekster la marbordan regionon, oni petos ĉi tiujn homojn por preni la laborpostenojn.

Madine VanderPlaat, profesoro de sociologio ĉe la Universitato de St. Mary's (SMU) diras: „Estas vera danĝero en Atlantika Kanado; nia loĝantaro rapide malkreskas.” Ŝi diras ke, se oni ne kuraĝigas enmigrantojn por resti ĉi tie, ekonomia risko pligrandiĝos. „Ni devas kreskigi la loĝantaron tiel, ke ĝi stimulos la ekonomion de Nov-Skotio aŭ Atlantika Kanado.”

Tiel ankaŭ konkludis la raporto „Interne-eksteren”, sed tiu konkludo povus esti endanĝerigita pro la sintenoj de kelkaj homoj kiuj loĝas ĉi tie, kaj Rick Emberley havas la informon por pruvu tion.

- Paul Hollingsworth, CTV News [kanada televida novaĝ-agentejo]
- Transskribis, tradukis kaj iomete mallongigis Bob Williamson

**NOV-BRUNSVIKAJ LERNEJOJ ĈESIGAS FRUAN ENMERGIGON
FAVORE AL PLIPOSTAJ FRANCLINGVAJ INSTRUPROGRAMOJ**

La Kanada Pres-agentejo (2008-03-14)

Frederiktono, NB - Nov-Brunsviko ĉesigos fruan franclingvan enmergigon en ĝia anglalingva lerneja sistemo, ago kiu gajnis preskaŭ tujan malaprobon de kelkaj grupoj en la ununura dulingva kanada provinco. La liberala registaro de la provinco jam decidis enkonduki la francan dum intensiva kurso en la kvina klaso, kaj poste oferti eblecon eniri enmergigon en la sesa klaso.

„Ĉi tiu ne estas ĝusta maniero... oni devas aldoni rimedojn,” diris Madeleine Dubé, konservativa kritiko pri edukado, en la provinca parlamento. Ŝi diris, ke la registaro eraras kaj devus plibonigi fruan enmergigon.

Wayne Lee, nov-brunsvika presidanto de Kanadaj Gepatroj por la Franca, diris ke la registaro ignoras la ekspertojn favore al plano kreita de politikistoj. „Eble la Ministro de Edukado venkas, sed efektive malvenkas la infanoj de la provinco kiuj ne havos instruadon pri la franca lingvo ĝis la kvina studojaro,” diris Lee.

La ŝanĝoj sekvas debatebla raporto kiu konkludis, ke 91% de la proksimume 1500 nov-brunsvikaj infanoj kiuj komencis la fruan enmergigan programon je 1995 jam rezignis pri la programo antaŭ ol ili komencis la gimnazion. Ministro de Edukado Kelly Lamrock diris, ke oni jam montris kiel nov-brunsvikaj studentoj kiuj pli malfrue komencas duan-lingvan edukadon atingas pli bonajn rezultojn.

Doug Willms, direktoro de la Kanada Instituto de Socia Politiko ĉe la Universitato de Nov-Brunsviko, diris ke, kvankam „ju pli frue, des pli bone” estas ofta regulo en edukado, tio ne tiom multe efikis por franca dua-lingva instruado en la provinco. „Kiam ili havas bonajn bazojn en la propra lingvo, legado kaj matematikaj lertecoj, kaj poste oni enkondukas duan lingvon, ili multe pli bone progresos,” li diris.

La liberala registaro deziras, ke 70% el la studentoj estu dulingvaj je 2012. Ĝis 2006, malpli ol unu procento el la anglalingvaj studentoj kiuj diplomiĝis povis bone regi la francan. La franclingvaj programoj daŭros ĝis la 12-a klaso. „Ĉiuj infanoj akiros bonkvalitajn spertojn pri la instruado de la franca lingvo dum sep jaroj en Nov-Brunsviko,” diris Lamrock. „Aldone, ĉef-instruistoj devos havigi aktivecojn en siaj lernejoj, kiuj instigos la uzon de la parolita franca lingvo. „Estos politiko por dulingvaj lernejoj kiu postulos, ke ĉiu mez-lernejo kaj gimnazio provizu spertojn pri lernado en la franca ekster la klasĉambro por aldoni al tio, kion oni lernas en la klasĉambro,” diris la ministro. La tempon, kiun oni antaŭe rezervis por franc-lingva instruado en la klasoj 1 ĝis 4, oni uzos por arto, muziko kaj sporto. Iu ajn studento kiu jam troviĝas en frua enmergiga klaso rajtas daŭrigi tion.

Graham Fraser, kanada komisiito pri oficialaj lingvoj, diris en anonco el Otavo, ke li maltrankviliĝas pro tio, ke la nov-brunsvika registaro forigis alternativon por junuloj por lerni la alian oficialan lingvon. Tamen, Fraser diris, ke li ĝojas pro tio, ke la registaro decidis konservi la celon de 70% de studentoj kiuj povos funkcii dulingve kiam ili diplomiĝos.

— Tradukis el la reto Bob Williamson

NOV-BRUNSVIKA DECIDO ĈESIGI FRUAN FRANCLINGVAN ENMERGIGON MISTIFIKAS LINGVO-ESPLORISTON

La Kanada Pres-agentejo (2008-04-01)

Frederiktono, NB - Esploristo kiu studas dulingvismon en Kanado diras, ke li ne povas kompreni kial la nov-brunsvika registaro ignoras popolnombradan informon kiu sugestas, ke frua enmergigo bone funkcias en Nov-Brunsviko. Jack Jedwab, de la montreal-bazita Asocio por Kanadaj Studoj, diras, ke la plej lastatempaj popolnombradaj rezultoj sugestas, ke Nov-Brunsviko sukcesas pli bone ol la plejparto de kanadaj provincoj pri la lernado far studentoj de la franca kiel dua lingvo.

La provinca registaro jam decidis elimini fruan enmergigon, kiu komencas en la unua klaso, favore al intensa franclingva programo en la kvina klaso, kiu haveblos al ĉiuj infanoj. NB-a edukministro Kelly Lamrock diras, ke ne sufiĉe da angla-parolantaj infanoj lernis la francan, malgraŭ tio, ke Nov-Brunsviko estas la ununura oficiale dulingva provinco en Kanado.

Jedwab diras, ke popolnombradaj rezultoj sugestas, ke franclingva instruado dum la fruaj jaroj estas decidiga. Tamen li diras, ke ĝenerale, dulingvismo malbone progresas en Kanado.

— Tradukis el la reto Bob Williamson

MORTIGA DANĜERO

Japanoj manĝas preskaŭ neniom da graso kaj suferas pro malpli da korinfarktoj ol la britoj aŭ nordamerikanoj.

Aliflanke, francoj manĝas grandan kvanton da graso kaj ankaŭ suferas pro malpli da korinfarktoj ol la britoj aŭ nordamerikanoj.

Japanoj trinkas preskaŭ neniom da ruĝa vino kaj suferas pro malpli da korinfarktoj ol la britoj aŭ nordamerikanoj.

Aliflanke, la italoj trinkas grandegajn kvantojn da ruĝa vino kaj suferas pro malpli da korinfarktoj ol la britoj aŭ nordamerikanoj.

Konkludo: Manĝu kaj trinku kion ajn vi deziras. Kio estas mortiga estas parolado de la angla.